

& Krioj de l' mizero:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 522 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Julio Baghy. Baladigis Martin Strid (2015) per modifeto de popolmelodio el sveda paroko Orsa kaj parte nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (#Forslunds:

(/Mi MiMi DoMi SoSo; SooFaFa ReFa LaLa; La dore doTi SooTi;Ti reTi domi mimi;)

?

(/Mi DoMi SoTi reeTi;Ti domi mimi mimi; relmi reTi SoTi reeTi;Ti domi mire mimi;)

(#Rekantaĵe: Mi dodo mire dooTiTi LaSi LaTi dodo; TiSo La La; FaMi ReRe Mi Mi i)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 /Vi loĝas en palaco, ; mi — en mizera ĉambro; min kovras ŝvit' de laco, ; freŝigas vin — la ambro.

(×:; **Aj, ŝiros mi la maskon de vi, ho hipokrito ; kaj vi hontos ; kiam veron frontos.**)

'2 Ornamas vin la oro, ; virinon vian — gemoj; muelas min doloro ; kaj de l' edzin' la ĝemoj.

.....

'3 Konservas vian sanon ; nektaro de la fablo; satigi min — eĉ panon ; ne havas mia tablo.

.....

'4 Senzorge luksajn vestojn ; infanoj viaj portas; malsato la intestojn ; de miaj idoj tordas.

'5 Predikas vi pri justo, ; perforton vi malbenas, ; dum ftizon en la brusto ; mi venki vane penas.

'6 Kaj tamen, se riproĉo ; ribelas el korfundo, ; tuj tondras via voĉo: ; "Vipbaton al la hundo!"

.....

'7 Ekhaltu la vipbato! ; Rigardu la mizeron, ; per kiu senkompato ; plenŝutis jam la teron!

.....

'8 Ho venu en la domon! ; Ho venu por minuto ; ekvidi min la homon ; en stato de l' jug-bruto!

.....

'9 Pasigu nur momenton ; en ranca sfer' de l' putro! ; Gustumu seban lenton ; de la vomiga nutro!

'10 Kaj trinku el la poto ; la akvon de la pesto! ; Baraktu en la koto ; sur mia pajla nesto!

'11 Rigardu la mienojn ; de la idaĉoj favaj! ; Karesu la ekzemojn ; de vangoj pusohavaj!

'12 Al brusto ilin premu ; por unufoja kiso ; kaj el la lipoj prenu ; spiraĵon de la ftizo!

'13 Kaj poste, se vi povas, ; nin draŝu per la vipo, ; ĝis kiam nin ni movas ; kaj mortos ve' sur lipoj!

'14 Sed ne prediku ordon, ; nek juston de l' socio ; kaj ŝparu nuran vorton ; pri helpa man' de Dio!

'15 Nin draŝu ĝis mortfalo, ; — sufiĉas jam la luktoj — ; ĉar nia vivregalo ; nur estas verm' el fruktoj!

'16 Plenumu vian arton, ; — ĝi ĉiam vin amuzas — ; se doni rajtan parton ; el vivo vi rifuzas!

'17 Sed faru tuj la taskon, ; kaj finu sen hezito, ; ĉar ŝiros mi la maskon ; de vi, ah, hipokrito,

'18 kaj pentros sen kompato ; sur mia pala vango ; la rozojn de l' venĝbato ; per — via propra sango!